

PREZO: 1.- Kr.

Löfdquist, Tierp 1951

MALGRANDA REVUO

Nro 1 • 1951

9a JARO

ENHAVO:

	Paĝo
Historiinterpretoj kaj historiprognozo, de H. S. Nyberg	1
Kelkaj konstatoj pri tradukado de poezio, de William Auld	8
Sendankeco?, de Rudolf Anders	20
Literaturo	25

Redaktoro — Eldonanto:

STELLAN ENGHOLM, HAGGE, SVEDUJO

MALGRANDA REVUO

aperas dumonate. Prezo 1 kr. (inkl. sendkoston). Jarabono 6 kr. Unuopa ekz. al eksterlando kontraŭ 3 rpk. — S. Engholm, Box 205, Hagge, Svedujo. Poŝta ĝirokonto 26 50 23. MR ne aperigas anoncojn aŭ informojn.

Nemenditaj manuskriptoj estas resendataj nur se akompanas ilin aŭ franko por resendo.

Perantoj

- Aŭstrio: Eldonejo "Tramondo" Neutorgasse 9, Wien I.
Belgujo: Flandra Esperanto-Instituto, P. van Humbeekstr. 3, Brussel W.
Brazilo: Sro Jozefo Joels, Caixa Postal 2 — Lapa, Rio de Janeiro.
Britujo: Libroservo de UEA, Heronsgate, Rickmansworth (Herts).
Ĉeĥoslovakio: Esperanto-Asocio en ĈSR, Uralské Nám. 9, Praha.
Danujo: Libroservo de CDEL, Hörmarksalle 5, Risskov.
Studenta Esperanta Klubo, Nitivoj 7, Kopenhago F.
Finnlando: Eldono Vilho Setälä, Onnentie 23, Helsinki Kå.
Francujo: Unuiĝo Esperantista de Francujo, 34 rue de Chabrol, Paris X.
Germanujo: Dr. Siegfried Ziegler Verlag, Engelbertstrasse 7, (13 b) München-Pasing.
Hispanujo: Sro Amado Pons, Sicilia 217, 1—2, Barcelona.
Israel: Sro J. Kohen-Cedek, P. O. B. 7015, Jerusalem.
Italujo: Sro Leo Costantini, Piazza Lagosta 2, Milano.
Nederlando: Sro L. C. Deij, Putsebocht 181, Rotterdam Z.
Polujo: E. Sakowicz, Parafialna 3, Nova Sol.
Svisujo: Sro O. Walder, Eigenheim, Romanshorn.
Usono: Libroservo de American Esperantist, 114 W. 16 St. New York 11.
Sro Arthur S. Kane, 1121 N. Central Ave., Glendale 2, California.

MALGRANDA REVUO

Nro 1

9a JARO

1951

Historiinterpretoj kaj historiprognozo

De H. S. Nyberg

La aŭtoro estas profesoro en semidaj lingvoj ĉe la universitato en Uppsala kaj eminenta specialisto pri la antikvaj religioj en Irano. Li apartenas al La Dek Ok (la sveda akademio). Tiu ĉi artikolo estas lia direktora parolado en la akademio ĉe ĝia solena jarkunveno en decembro 1950.

La paroladon presigis la gazeto Svenska Dagbladet sur la kulturartikola loko. La redakcio afable permesis tradukon laŭ tiu artikolo.

Tradukis S. Engholm.

1950 — jarcentomezo! Se ni superrigardas nian historion, ni trovas la mezpunktojn de la jarcentoj sufiĉe senoventaj. La plej dramecaj kaj plej gravaj okazoj en la vivo de nia popolo troviĝas ĉe la fino kaj la komenco de la jarcentoj. Inter ili kuŝas kvazaŭ malplenaĵoj: nek 1850 nek 1750 okazis io, kion oni memoras ekster la rondo de specialistoj; en 1650 regis malstreĉiĝo post la tridekjara milito; en 1550 la jam maljuneca Gustav Vasa¹ atingis relativan trankvilon kaj ordon en sia regno kaj ĝuis la fruktojn de pli fruaj klopodoj. La mezepoko ne multe ŝanĝas la bildon. Rimarkinde estas, ke la samo ŝajnas validi por la ĝenerala eŭropa historio.

Ni ridetus, se iu en nia tempo volus konkludi ĝeneralan historian leĝon, laŭ kiu gravaj eventoj ĉiam okazas en la komenco aŭ la fino de la jarcentoj kaj ke iliaj mezoj ĉiam estas malplenaĵoj. Tiaj pensmanieroj tamen regis la homan spekulativon en ĝia infanaĝo kaj ankoraŭ ne tute perdis sian potencon super la mensoj. En la primitiva spekulativo la grandaj tempunuoj havas sian fiksitan ritmon, ili komenciĝas kun la

alta streĉo de la novkreado kaj finiĝas en kaoso, kaj inter tiuj ĉefpunktoj kuŝas larĝa zono el griza ĉiutaga penado.

Estis la fundamenta ideo de la astrologio, ke ĉio okazanta sur nia tero estas dependa de la stela mondo super ni. La steloj estas diecaj potencoj kaj regas la terajn aĵojn laŭ ne-ŝanceleblaj leĝoj, kiujn la homoj povas malkaŝi kaj interpreti sed ne modifi aŭ ŝanĝi. Ĉar la suno, la luno kaj la steloj estas la fundamento por ĉiu tempokalkulo, la paŝo estas mallonga de la astrologio al la apokalipsa mondepoka doktrino. En klasika elformado ni renkontas tiun ĉe la antikvaj persoj. Laŭ ili la mondokazado estas limigita je dekdu jarmiloj, unu por ĉiu stelfiguro en la zodiako, kaj tiuj jarmiloj formas la dekdu monatojn de la mondojaro. Tiu mondojaro havas kvar sezonojn, ĉiu ampleksanta tri jarmilojn: unue la printempo de la nekonscia praĉkzisto, poste la paradiza somero de la tera kreaĵo, kiu tamen finiĝis per invado de la malbona potenco en la belan mondon de Dio; post tio aŭtuno kun drameca lukto inter bono kaj malbono sur nia venenita tero, ĝis fine venos la solviĝo de la dramo post la severa vintro de la tri lastaj jarmiloj. Super tiuj lastaj jarmiloj prezidas la mond-savantoj, nome laŭvice la Profeto mem, Zaratustro, kaj liaj du reenkarniĝintaj filoj. La apero de ĉiu profeto signas novan fortostreĉon, sed lia jarmilo finiĝas en disfalo kaj kaoso, ĝis la ankoraŭ ne naskita filo de Zaratustro aperas kiel Mondsavanto kaj Mondjuĝanto. La mortintoj reviviĝas, la mondo puriĝas en fajro, la malbonaj estas forigataj el la ekzisto, kaj sur transformiĝinta tero vivas la justofidelaĵ eternan vivon sen malsato kaj soifo, sen malĝojo kaj mizero. Ĉiuj okazoj en la mondojaro estas precize antaŭfiksitaĵ kaj legeblaj en la neŝancelebla irado de la steloj, kaj la inicito kaj saĝulo povas ĉiam diri, je kiu punkto en la mondokazado oni troviĝas, kaj antaŭdiri, kio poste okazos.

Tiu mondepoka doktrino sorĉatenis ankoraŭ Friedrich Nietzsche. En konservita notaĵo li diras, ke li longe hezitis, kiun nomon li donu al sia revita superhoma figuro; fine li decidiĝis por Zaratustro "ĉar", li diras, "fine mi devas doni la honoron al perso; persoj kiel unuaj pensis historion kiel unuaj kaj grandtrajte — serion da evoluoj, super ĉiu

el ili prezidas profeto. Ĉiu profeto havas sian H a z a r, sian miljaran regnoŝ." Kun la Zaratustro de la persoj tiu de Nietzsche tutcerte havas nenian komunan trajton, sed la ĵusa citaĵo trafas ion esencan kaj en la persa mondepoka doktrino kaj en la historikoncepto de Nietzsche mem. La mondepoka doktrino estas la unua provo de la homa penso kunigi sub unu aspekton kaj de pli alta vidpunkto la tutan okazadon en nia mondo. Sed ĝi estas primitiva historimitologio efektivigita kun plena indiferento antaŭ historiaj faktoj. Nietzsche pravus, kiam li diras, ke la persoj kiel la unuaj pensis historion grandtrajte, sed pensis historion ne estas la sama kiel pensis historie. La propra tradicio de la persoj pri iliaj konkretaj historiaj travivaĵoj estas ekstreme malriĉa kaj realofremda. Oni bone komprenas, ke Nietzsche sentis profundan internan parencecon al tia historikoncepto. Li ja rigardas sin mem kiel la finon de unu epoko kaj kiel profeton de la venonta superhomo; lia koncepto pri la mondokazado estas same multe mitologia kiel tiu de la antikvaj apokalipsuloj.

Tiu mondepoka doktrino faris sian venkiron tra ĉiuj grandaj religioj, kiuj troviĝas interne de nia horizonto. Pli aŭ malpli transformita ĝi estis alprenita de la judaismo, de la kristanismo kaj de islamo, kaj per tiuj religioj ĝi fariĝis la plej disvastigita populara historifilozofio de diversaj kulturrondoj. Kune kun la astrologio ĝi tra la tuta mezepoko superregis la mond- kaj vivkonceptaron. La jaro 1000 p. Kr. alportis inter la kristanoj kaj en Okcidento kaj en Oriento fortajn apokalipsajn sentojn, kiuj influis dum pluraj postaj jarcentoj. La renesanco ne atakis tiujn doktrinojn. Ĉiuj reĝoj kaj dukoj en oriento kaj okcidento havis proprajn astrologojn kaj zorge atentis la signojn de la tempoj. Erik XIV² ricevis zorgan astrologian edukon kaj pasie okupiĝis pri la astrologia arto. La granda astronomo Tycho Brahe³ pretigis horoskopojn. Ankoraŭ nuntempe homoj en nia lando kaj en Eŭropo provas elkalkuli "tempojn kaj horojn" laŭ la biblio kaj cerbumas pri la nombro de la besto en Apokalipso. En la flankstratoj de la urboj en Proksima Oriento oni povas kiam ajn akiri horoskopon aŭ aŭskulti interpreton de la mondepoka doktrino en la redakto de islamo. Kiam mi estis en Egiptujo por studoj

je la tempo antaŭ la eklezia ekumena kunveno en Stokholmo 1925, sendis min Nathan Söderblom¹ al la estro de la kopta eklezio, la maljunega, laŭdire centjara patriarko Ĉirilo V, por transdoni inviton al reprezentado de lia eklezio ĉe la kunveno. "Kia utilo estus en tio?" respondis la patriarko. "La lasta tempo tamen baldaŭ venos laŭ la volo de Dio." Ni aŭdis, ke modernaj ŝtatestroj kaj popolgvidantoj en krizaj situacioj serĉis helpon en la arto de la astrologoj. Ĉe la homoj en ĉiuj kulturaj stadioj estas neekstermeblaj la sopiro forŝiri la kurtenon, kiu kaŝas la estonton, la emon transmeti la respondecon sur sortoligitajn potencojn, la sopiron al radio de espero en la mallumo de la ŝtormoj.

Se la apokalipsuloj faras la historiajn okazojn funkcio de la sortoligita Tempo, alia forta tendenco kontraŭe faras la tempon funkcio de la okazoj. Tiu tendenco originas en la obskuraj ŝaktoj de la sentovivo sed ne en la cerbo, ĝi fontas el la mizero kaj la sopiro de la homoj. Granda ago, ĉiontuŝa ŝanĝo, okulfrapa ŝanĝiĝo estas perceptata kiel la mateniĝo de nova tempo: venas nova tago post malluma kaj peza nokto, nun venas la feliĉotempo, pri kiu oni revis en la severa tempo de malfeliĉo kaj mizero. Tiam "renaskiĝas la tempo maljuniĝinta"; nova tempokalkulo komenciĝas, se oni entute pensas pri tempokalkulo en stato, kiun oni revas eterna. Tio estas la sentostato de la eskatologio; ĝi estas revolucia kaj entuziasma: "La malnova forpasis, jen ĉio estas nova." La eskatologio havas pramalnovan originon. En la griza antikva tempo ĉiu reĝoŝanĝo, ĉiu dinastiŝanĝo, ĉe ĉiu novjara tago alportis eskatologiajn sentojn. La kutimo komenci novan jar-kalkulon por ĉiu nova reĝo havas eskatologian originon. Ĉiuj revolucioj en la historio celas al starigo de eterna feliĉoregno, kaj esence ili estas eskatologioj. Kaj la franca revolucio kaj la faŝista en Italujo enkondukis novajn tempokalkulojn. La tempo faras turnon, por tiel diri; jam frue ni renkontas tiun ideon sur la paĝoj de la historio, kaj ĉiam ĝi denove aperas. Ĉu ni en la 1930aj jaroj ne aŭdis senĉese pri io nomata "Zeitenwende"?

La eskatologiaj erupcioj apartenas al la ne leĝofiksita sfero de la sentovivo kaj certe ĉiam spitos ĉiun formon de kultur-

kritiko. La apokalipsaj mondepokaj doktrinoj kontraŭe estas la malnovaj formetitaj vestoj de la scienco, kiuj pluvivis maksimume kiel popolkostumoj. Sed la eternaj demandoj pri de kie kaj kien en la historio, kiujn ili provis respondi, restas same neresponditaj kaj ĉiam same stimulaĵaj, kaj ankaŭ nian tempon ili ne lasis en trankvilo — kaj apenaŭ iu ajn alia tempo donis pli riĉan materialon por pripensado pri la naturo kaj la direkto de la historia okazaĵo.

Nur tiu ĉi jarcento donis al nia historia konscio planedan horizonton, nur nun ni komencis ricevi tutcan superrigardon pri la kulturoj de la tero, vivajn kaj mortintajn, kaj eblecon studi ilian internan historion. Se la horizonto de la 18a jarcento tute kaj tiu de la 19a sufiĉe mallarĝe estis eŭropaj, la 20a jarcento metis nin eŭropanojn en grandan tutplanedan interrilaton, kie nia rangloko estas pli kaj pli forte atakata. Kompara kulturesploro estas la ĉirpunkto por la nuna histori-filozofio, kiu provas malkaŝi la internajn leĝojn de la historia okazaĵo por — kio estas ne ĉiam klare dirita sed ĉiam subkomprenita celado — el tio konkludi nian estontan sorton. Ni menciuj nur la du plej konatajn nomojn: tiun de la germano Spengler, la pereoprofeto de la unua mondmilito, kaj de la anglo Arnold Toynbee, la historiinterpretanto kaj antaŭdiranto de la tempo inter la militoj. Ambaŭ donas tutecajn bildojn, konstruitajn per helpo de kolosa erudicio, kiuj ampleksas la tutan globon, kaj ambaŭ havis al nia kulturkonscio influon, kies efikokampo ankoraŭ estas apenaŭ superrigardebla.

Por Spengler estas ĉiuj diversaj kulturoj organismoj sam-specaj kun plantoj kaj bestoj; li serĉas la morfologion de la kulturoj. Same kiel ĉiuj vivaj organismoj la kulturoj dependas de naturfiksita sorto: kiel tiuj ili naskiĝas, evoluas, maturiĝas, forvelkas kaj mortas laŭ la samaj neŝanceleblaj leĝoj. Estas kurioze observi, kiel facile Spengler alprenas la antikvajn apokalipsajn esprimojn pri mondepokaj sezonoj; ankaŭ li parolas pri printempo, somero, aŭtuno kaj vintro de la kulturoj. Ne estas troigo diri, ke liaj malhcle patosaj profetaĵoj elvokis senton similan al apokalipsa kultursento: ni vivas en la vintro de nia kulturo, kiam ĝi antaŭ longe ĉesis esti kulturo en la

senco de kreanta kaj falis en la neeviteblan mortostadion de stagnanta civilizo; antaŭ ni kuŝas ŝajne nur la nokto de perejo, kaj sen espero ni rigardas en la meduzovizaĝon de la estonteco.

La historirigardo de Toynbee estas pli hele nuancita. Por li la kulturrondoj estas homaj komunumoj kun ĉiuj kvalitoj, kiuj karakterizas tiajn; li esploras ilian sociologion. Li volas trovi la komunajn faktorojn, kiuj decidas pri la estiĝo, kresko kaj dissolviĝo de ĉiuj kulturoj. En la mondo de Toynbee ne regas blinda kaj nepersona fato. Anstataŭe li enkondukas nin en homaran dramon. Severa naturo, malfacilaj nutrajkondiĉoj, malamikaj atakoj de diversaj specoj "defias" grupon da homoj, antaŭ ĉio la plej fortajn kaj antaŭvidajn inter ili; tiuj "akceptas" la defion kaj tiras kun si aliajn kaj fariĝas iliaj gvidantoj, modeloj kaj aŭtoritatoj. Tiel estiĝas komunaj entreprenoj por venki la mizeran staton kaj krei pli bonajn cirkonstancojn. Tiuj entreprenoj liberigas la latentajn naturdotojn kaj fortojn de la grupo. Ilin portas komuna fido al certaj fundamentaj valoroj, estiĝas socia ordo, markita de la personecoj de la gvidantoj, kaj tiel elkreskas kultursocio. Kiam la dekomenca moviĝo de la kultursocio atingis certan ekvilibran staton, aperas disigajn tendencojn: la fundamentoj de la kredo ŝanceliĝas sub la kritiko de la racio, la socian ordon rompas internaj bataloj, tutaniman aliĝon al potencaj gvidantaj personecoj anstataŭas ŝablona imito de certaj modeloj; la disfala proceso de la kulturo komenciĝas. Toynbee emfaze malakceptas la koncepton de Spengler pri la kulturoj kiel organismoj, sed li mem ne sukcesas eviti la esprimojn "kresko", "maturiĝo" k. s. pri ilia vivo, metaforoj, kiuj malgraŭ liaj kontraŭasertoj foje havas sufiĉe konkretan karakteron. Li tamen ne rekonas iun sortofiksitan determinismon en la paso de la historio: kulturo en disfalo certe povas reviviĝi per nova "defio" kaj ĝin sekvanta "akcepto". Ni do havas iomete da espero; sed ankaŭ laŭ la historirigardo de Toynbee la signoj de la tempo estas timigaj, kaj estas klare, ke ni troviĝas en la riska zono.

Certe estas tre grave, ke ni provas kolekti ĉiujn instruojn de la historio kaj utiligi ilin antaŭ tiu krizo kun necerta fino, kiun la eŭropaj popoloj kaj kulturformoj nun trapasas. Sed se oni plene aŭ duone kondamnas nin al morto, ni malgraŭ

ĉio emas ekzameni la premisojn. Finfine tiuj eble ne estas tute certaj. Eble ni eĉ povas riski modestan demandon, ĉu la historifilozofoj estas la ĝusta forumo por decido pri tiu afero kaj ĉu ilia antaŭdirado estas pli fidinda ol tiu de la malnovaj apokalipsuloj. Povus eĉ esti tiel, ke ili faris la saman eraron kiel tiuj: pensi historion pli ol pensi historio. La pruvilo pri la solideco de teorio aŭ sistemo estas ĉiam ĝia rezisto antaŭ la konkretaj faktoj, kiujn oni volas klarigi. La historifilozofoj de tiu ĉi jarcento mirigas nin per vasta erudicio, sed oni foje havas la senton, ke la vasteco estas gajnita je la kosto de profundeco; se oni zorgo ekzamenas ilin, estas malfacile en tiuj bildoj, kiujn ili laŭ siaj teorioj desegnas de la sortoj de popoloj kaj kulturoj, rekoni la konkretan realon. Ni nordanoj apenaŭ emas akcepti la koncepton de Toynbee pri la antaŭkristanisma evoluo de Skandinavio kiel abortivé civilization (sterila kulturo — rim. de la trad.) por ne menciigi aliajn realofremdajn prijuĝojn. Fine leviĝas modesta dubo, ĉu iu ajn teorio, iu ajn scienca metodo efektive kapablas kapti la tutan realon de la historia okazado. Estas vere, ke la elementoj, kiuj konsistigas historian okazaĉenon, estas nombre limigitaj — la homoj ĉie sufiĉe similas unu la alian — sed la eblaj kombinoj de tiuj elementoj estas senfinaj — la homoj estas ankaŭ estaĵoj ne leĝofiksitaĵoj — kaj en diversaj tempoj kaj diversaj landoj ili neniam ripetigas en ekzakte sama formo. Povas troviĝi similecoj kaj analogioj inter diversaj okazaĉenoj, sed analogioj ne estas la sama kiel identeco. Ni ne kapablas en la origina formo rekonstrui ĉiujn faktorojn, kiuj en la pasinto decidis okazaĉenon, aŭ tiujn kombinojn de fizikaj kaj psikaj fenomenoj, kiuj decidis la rezulton.

Kun la sociologia scienco kiel elirpunkto oni en nia tempo faras prognozojn pri multaj sociaj cirkonstancoj. Tiuj prognozoj donas proksimiĝe korektajn respondojn sed havas ĉiam nur relativan validon. Ili estas donataj nur por mallonga tempo. koncernas nur certajn difinitajn flankojn de la socia vivo kaj validas sur la premo, ke certaj konataj faktoroj en la nuno restos proksimume konstantaj en certa estonta tempospaco. Neniu el tiuj premisoj taŭgas por la pasinto, pri kiu la historio povas ion instrui al ni. La historio pri la pasinto ne estas

uzebla kiel fonto por prognozaj pri estontaj historiaj okazoj.

Tiel la nuntempa historifilozofio ne helpas nin antaŭ nia estonta sorto. Ĝi ne povas montri la vojon pli bone ol la malnova apokalipsa doktrino. Ni devas ankoraŭ ĉiam iri nian vojon sen klara kompreno pri la celo, al kiu ĝi kondukas, ni devas ĉiam lukti sur la arĉo de la historio sen ekscii ion pri la finiĝo. La sola, kion la historio instruas al ni, estas tio, ke la solaj armiloj, kiujn ni homoj disponas kontraŭ la ŝtormoj kaj battoj de la sorto, estas la moralaj kvalitoj: kuraĝo kaj fido, elteno kaj pacienco, brava spirito kaj kapablo sengrumble kaj senplende elteni la destinojn de la sorto. Neniu histori-filozofio povas doni al ni pli multe.

¹ Sveda reĝo 1523—1560.

² Filo de Gustav Vasa, reĝo 1560—1568.

³ Fama dana astronomo, 1546—1601.

⁴ Sveda ĉefepiskopo, 1866—1931.

Kelkaj konstatoj pri tradukado de poezio

(Prelego en la Glasgova Esperantosocieto la 23an de oktobro 1950.)

De William Auld

1

Mi volas klarigi al vi, kial mi elektis la temon de mia hodiaŭa parolado. Finfine, nur unu fojon en la jaro oni havas okazon prezenti antaŭ la societo la rezultatojn de la propra lastatempa priesperanta laborado; kaj mi kuraĝas supozi, ke al seriozaj samideanoj miaj konkludoj pri la fako, kiu min ĉefe interesas kaj en kiu mi estas kompetenta, ne estos sen intereso, same kiel la rezultatoj kaj atingoj de laborantoj pri aliaj fakoj nepre interesas min. Estas ja vere, ke ni vivas — ĉu bone, ĉu male — en mondo de specialistoj; ankaŭ en Esperantujo la seriozaj laborantoj devas, aŭ almenaŭ devus, elekti por kulturado tiun kampon, pri kiu ili estas plej kompetentaj. Tiuokaze tamen, ili ne forgesu, ke ilia elektita kampo estas nur unu el la multnombraj kampoj, kiujn ampleksas nia bieno: la Esperanto-

movado; ili memoru, ke la komuna prospero dependas de la prospero de la unuopaj kampoj, kaj tial ili atentu kaj kuraĝigu la laboradon de aliaj.

Mi nun povas prezenti al via konsidero plurajn konkretajn atingojn sur kampo apenaŭ ĝis nun prilaborita: la tradukado de la angla poezio. Eble en la tuta movado neniu fako estas tiom miskomprenita. Mi celos montri, ke tiu miskompreno devenas de ĝenerala malĝusta sinteno al la problemoj, kaj per konkretaj ekzemploj pruvi, ke la neglektita kaj certagrade malestimata kampo estas fakte tre fekunda.

La 1an de julio 1950 komenciĝis la laborado super la poezia parto de la unua volumo (ĝis 1800) de la eldonota Angla Antologio. Ĝisdato, t. e. post nur 16-semajna laboro, estas jam tradukitaj 1350 versoj da poezio, plus proksimume 300 versoj de ankoraŭ ne finverkitaj pli longaj pecoj. La precizajn ciferojn pri la samtempe prilaborata poezia parto de la skota volumo mi ne havas, sed mi scias per la nombro de pecoj tradukitaj, ke la sumo estas komparebla al la angla parto. Vi do komprenas, ke tia multa kaj celkonscia laborado jam rezultigis kelkajn evidentajn konkludojn el la praktika sperto. Krome, neniu el la kunlaborantoj estis novbakita tradukanto de poezio: ĉiuj jam antaŭe pretigis sin al la tasko per sufiĉe grandskala tradukado el la angla kaj skota poezioj. Pro tio vi povas esti certaj, ke la konkludoj nun prezentotaj ne estas sekaj kabinetaj teoriaĵoj, sed legitimaj konstatoj subteneblaj per praktikaj pruvoj.¹

La ĝenerala miskompreno pri la temo kaŭzas malĝusta sinteno de pluraj aŭtoritatoj al la demando. Kelkaj amikoj volas tro facilanime antaŭdifini, kion kapablas kaj kion ne kapablas nia lingvo. S-ro Stutlard, ekzemple, sugestias, ke ne eblas reprodukti dialektojn en Esperanto². Li faras tion malgraŭ la fakto, ke i. a. Baghy, Schwartz, Forge, Bodo, Mijak-Sihej, kaj eĉ Zamenhof en "La Revizoro", jam praktike pruvis per mallongaj ekzemploj, ke almenaŭ certagrade tio estas ebla. Oni tro ofte volas meti limojn laŭ teoriaj argumentoj sen sufiĉe profunda praktika eksperimentado; kaj ĝenerale ĝis nun la sperto post iom da tempo pruvis la absurdecon de tiaj antaŭjuĝoj. La frazo "nia lingvo ne kapablas

tion" en la buŝo de unu aŭ pluraj homoj fakte signifas "mi (aŭ ni) ne kapablas tion". Puŝintoj emas (tre homece!) kulpigi la lingvon anstataŭ sin mem pri evidentaj mankoj.

Sur la kampo de la poemtradukado tiu emo tre klare evidentiĝas. Oni kun mirinda aplombo faras pri la temo senombrajn asertojn, kiuj baziĝas sur nesufiĉa sperto kaj kompetento. Ekzemple, en la antaŭparolo al la Sveda Antologio oni legas: "Nun lasta vorto pri la poezia parto, kiu ne estas tiel facile tradukebla kiel la prozo. Bonan tradukon oni ne ricevas per nura peto aŭ propono. La tradukanto bezonas inspiron, kaj tiu ne venas pro mendo. Do la fina elekto ne estas farita el la sveda materialo, kiu tre malegale altiris la tradukantojn, sed el la esperantaj tradukoj." Mi diru tuj, ke ni eklaboris laŭ rekte kontraŭa principo. Jam antaŭ ol komenci la laboron, ni elektis tiujn poemojn, kiuj plej inde prezentas la epokon de la volumo, kaj ni decidis, ke ni tradukos ĝuste tiujn verkojn por la antologio. Post 16-semajna celkonsecia laborado pli ol la duono de la tasko estas farita kaj ni scias tute certe, ke ankaŭ la cetera tasko plenumiĝos.

Ho, mistera vorto "inspiro"! Kiom da krimoj estas faritaj je via nomo! Tre ofte mi aŭdis la cititajn frazojn el la sveda antologio en la buŝo de malkompetentuloj, kiuj uzas ilin aŭ por klarigi sian propran fiaskon aŭ por antaŭdifini limojn al la ebleco de traduko. La inspiro "ne venas pro mendo". Tion ni konsentas. Sed la sekvo implicita en tiu facila frazo estas jena: ke la poeto devas atendi trankvile ĝis la inspiro bonvolas viziti lin, fulmofrapo el malplena aero; kaj al tio ni respondas: "Granda eraro!" La inspiro ne estas tio, kio ebligas al la poeto liveri unu verkon anstataŭ nenion; ĝi estas tio, kio ebligas al la poeto liveri majstran verkon anstataŭ simple kompetentan. Kaj tiun, kiu nenion farante atendas ĝin, ĝi neniam vizitas. La poeto devas penc laboradi, ŝviti, sin ekzerci, barakti kaj humili, kaj nur poste, de tempo al tempo, se li estas aparte bonŝanca, la inspiro dum kelkaj minutoj gvidos lian manon.

Ankoraŭ en la antaŭparolo al la Sveda Antologio ni trovas alian ekzemplon² de tiu trompa emo antaŭdecidi pri la ebleco de tasko: "la plej belajn el la lirikaĵoj ni konsideras netradukeblaj en kiun ajn lingvon". Kia aroganto! Ĝi estas

tre tipa kaj tre disvastigita sinteno; sed mi diras al vi: ne mankas tradukoj en Esperanto, kiuj eĉ superas la belecon de la originaloj! Ĉu ni posedus ilin, se la poetoj akceptus senkritike la ŝiboletojn de la filistroj?⁴ La poetoj starigas al si la provizoran supozon, ke ĉio direbla en unu lingvo estas direbla ankaŭ en alia en formo, kiu redonas ĝuste la efikon de la originalo — kaj ili elprovas sian principon per entrepreno de ŝajne necblaj taskoj. La vera tradukanto fidus al la lingvo; lia devizo estas: "Nia lingvo kapablas ĉion!" Tion mi motivas laŭ la vortoj de unu amiko mia en privata letero: "Kio distingas la veran esperantan poeton, respektive tradukanton, de la diletanto estas tio, ke la vera esperantisto havas senfinan fidon al la ebloj de la lingvo por liveri ĝuste tiun vorton, kiun li serĉas. Kiam li ankoraŭ ne trovis ĝin, li scias, ke ĝi ekzistas. Per tiu absoluta fido — li ĝin trovas. Dume la diletanto malfidas la eblojn de la lingvo, kaj li uzas kompromison opiniante, ke tio estas la plej bona, kion la lingvo liveras. Por trovi la 'unusolan' vorton necesas konfida certo, ke ĝi ekzistas; se oni havas tion, oni havas ankaŭ la impeton por ĝin atingi."

Ŝajnas al mi, ke tiu sinteno senfine superas la sintenon de alia samideano, kiu sendis al ni malnovan tradukon (de iu alia), mem konfessante, ke ĝi "ne estas tute kontentiga" (ĝi ja ne estis!), sed aldonante: "Mi dubas, ke iu alia multe pli bone farus, ol (la tradukinto)". La stultecon de tiu antaŭjuĝo pruvis la fakto al li nekonata, ke jam tiam ekzistis pli bona traduko de la koncerna poemo! La vere kompetenta poeto estas ĉiam rekonebla per lia humileco. La vere kapabla tradukanto ĉiam opinias, ke pli bona solvo estas ebla, eĉ de liaj propraj tradukoj. Li neniam prezentas al si, ke tiu aŭ alia traduko estas la ununura, unu fojon por ĉiam perfekta traduko de la verko. Maksimume li diras, ke ĝi estas la plej perfekta, kiun li mem kapablas verki — sed eĉ tion li diras nur malofte!

2

Certe ne necesas emfazi, ke tradukado de poezio estas grava por la lingvo pro tio, ke per la sukcesa redono de la naciaj majstroverkoj oni ebligas al alilingvuloj ekkoni la trezorojn

de fremdaj kulturoj kaj samtempe pravas, ke la internacia lingvo estas inde uzbla ankaŭ por kulturaj celoj. Sed poezitradukado havas alian, malpli agnoskitan utilon por la lingvo, utilon pli internan, pli indiĝenan. Nome, se la poeto alprenas sufiĉe altajn kriteriojn, la poemtradukado kondukas al koncizeco kaj trafeco de esprimo. La tradukanto devas eltrovi kaj utiligi ĉiujn eblecojn, kiuj kuŝas latentaj kaj implicitaj en la lingvo; tio kondukas al plena liberiĝo el la katenoj de la nacia lingvo, ĉar oni devas rekrei la poemon en severa kadro, strikta formo, kaj ne povas kontentiĝi per laŭvorta traduko el nacia lingvo, kiel povas tro ofte la proztradukanto. Se laŭvorta traduko de nacia frazo ne tuŝas la oreilon malagrabla, la proztradukanto facile kontentiĝas per tiu solvo, anstataŭ serĉadi pli profunden por eltrovi eĉ pli bonan esprimmedon. Vi memoras, ke Kabe diris⁵: "La originala verkisto ĉiam iel povos 'eltiri' sin, li simple ne uzos malfacilajn esprimojn aŭ simple ellasos aŭ aliajn donos". La neceso trovi solvon laŭ la postuloj de la originalo provizas al la tradukanto tiun necesan disciplinon, sen kiu progresado aŭ ia granda verko ne estus ebla. Kaj la disciplino estas senfine pli rigora en poemtradukado, ĉar en ĝi ne temas simple redoni la sencan kaj signifon, sed temas redoni ilin en severe antaŭdifinita formo. Sen la disciplino, ĉu de interne ĉu de ekstere, neniu granda verko plenumiĝas. Tiun ĉi diferencon inter la tradukanto kaj la originala verkisto malatentis sro Butler, kiam li skribis lastatempe⁶, ke Kalocsay sentas bezonon de poezia terminaro sed Baghy kaj Piĉ ne. Li malatentis la fakton, ke Baghy verŝajne tradukis nur unu poemon dum sia vivo⁷ kaj Piĉ, lau mia scio, neniun; Kalocsay, aliflanke, tradukis "Ĝenera Bukedo", "Infero" de Dante, "La Floroj de Malbono" de Baudelaire, poemojn en hungara, bulgara kaj svisa antologioj ktp kaj kompreneble trovis neeviteblajn nuancojn en la originalaj verkoj, kiujn originala verkisto en Esperanto estus povinta simple preterlasi. Nome, la originala verkisto povas tro facile kontentiĝi: la tradukanto estas la esploristo kaj pioniro. Kaj la senfina praktika provado de la eblecoj de la lingvo povas porti nur utilon al la lingvo, se vi konsentas, ke nia lingvo, se ĝi devas kapabli ion, devas kapabli ĉion. Vi memoras, ĉu ne,

ke Zamenhof tradukis "La Batalo de l' Vivo" simple pro tio, ke iu iom graveta persono diris (rimarku ankoraŭfoje la aprioran antaŭdifinon de eblecoj), ke traduki ĝin ne eblas. Kaj ĉiam la laikoj pretendos, ke Esperanto ne taŭgas por traduki tion aŭ tion, kaj nur kiam ĉiuj ĉefverkoj de la mondliteraturo estos tradukitaj en Esperanton, ni povos silentigi tiajn kritikojn.

Estas tre grave, ke la poemtradukado liberigas la tradukanton el katenoj de la nacia lingvo. Ekzemple, nur tiel oni komencas konstati, ke ekzistas ofte granda diferenco inter la signifoj de samradikaj esperantaj kaj ekzemple anglaj vortoj. Tre, tre ofte, angla vorto posedas nuancojn, kiujn ne havas la ĝemela esperanta vorto. Ekzistas tiom da ili, ke ne eblas eĉ komenci liston pri ili — pantomimo, akademio, familiara, cinika, karavano estas kelkaj, kiuj tuj venas en mian kapon — kaj la proztradukanto povas facile preteratenti tiun ege gravan fakton, ofte kun bedaŭrinda kaj embarasa rezulto. Oni devas memori, ke esperanta vorto povas esti parenca al vortoj en pluraj naciaj lingvoj, kie ĝi havas tre diversajn signifojn. Ekzemplo estas "cinika", kiu en angla lingvo signifas "misantropa, malestimanta", sed en aliaj nacilingvoj, kiel ankaŭ en Esperanto, havas maldecan nuancon, nome "senhonte maldeca, senhontega" ktp. Tial, por eviti miskomprenojn, oni devas tre zorge atenti la signifojn de la diverslingvaj vortoj, kaj ĉar poemtradukanto okupas sin unuavice pri signifoj, li per tio konservas la semantikan purecon de niaj mirinde esprimivaj vortoj.

Ekzemplon de la graveco de signifoj al la poemtradukanto ni trovas en jenaj versoj el la "Elegio" de Gray:

Fair Science frowned not on his humble birth,
And Melancholy mark'd him for her own.

Proza tradukanto tro facile povus traduki "Science" kaj "Melancholy" per "scienco" kaj "melankolio", ĉar la vortoj aspektas simile; sed la poeto, kiu devas sin okupi pri signifoj, konscias, ke tiu traduko ne donas kontentigan sencan, kaj li per esploroj trovas, ke en la 18a jarcento "science" signifis

"kono" aŭ "klero" (a.: knowledge) kaj "melancholy" signifis "medito". Tial ni trovas, ke la traduko:

Naskiĝon lian ne neglektis Klero,
kaj ame prenis lin al si Medito

ne enhavas la vortojn "scienco" kaj "melankolio", tamen redonas la plenan signifon de la originalo.

La kelkfoje aŭditaj plendoj, ke Esperanto estas "pli longa" lingvo ol la naciaj, devenas de tiu emo traduki laŭvorte anstataŭ eluzi la eblojn entenatajn en la semantiko de la esperantaj vortoj. Kompreneble laŭvorta traduko el ekzemple la angla estas en Esperanto pli longa ol la angla frazo, sed ĝenerale pli kompakta, pli pure esperanta traduko samtempe ekzistas, kaj pro la postuloj de la strikta formo la poeto havas la impeton ilin serĉi.

3

Esperanto estas lingvo supermezure riĉa je rimoj; kontraŭe, la angla lingvo estas aparte malriĉa je rimoj. Dorothy Sayers skribis en la enkonduko al sia traduko de la "Infero": "La angla estas 'malriĉa je rimoj' ĉar ĝi estas rimarkinde riĉa je vokalsonoj . . . Oxford English Dictionary citas ne malpli ol 52 indiĝenajn ekzemplojn." Krome, granda procento de anglaj vortoj estas neniel uzebla kiel rimoj. Aliflanke, Esperanto posedas nur 5 vokalojn plus eble 6 diftongojn, kaj preskaŭ ĉiuj esperantovortoj estas uzeblaj kiel rimvortoj, eĉ sen la bizara rezulto, kiun liveras la tre sprita rimado de ekzemple Gilbert, Browning, Hood, en angla lingvo. Eĉ la unikaj esperantovortoj ne estas nura balasto en la rimvortaro. Ekzemple, "kvazaŭ" kaj "tamen" povas tute nature trovi rimojn:

La lun' mistera palis kvazaŭ
vualus ĝin arĝenta gaz' aŭ
diafana mortotuko,

au:

Atendis ĝin la morto, tamen
la stulta muŝo flugis flamen.

Eĉ la dua ekzemplo ne efikas ridige, kiel ekzemple en angla lingvo:

About binomial theorem I'm teeming with a lot o' news,
With many cheerful facts about the square of the hypotenuse.

Tiun eĉon de la esperanta lingvo tre frue malkovris Grabowski, kiu, vi memoras, respondis al iu tro aplomba kritikanto, kiu pretendis, ke ne eblas traduki verse la fabletojn de La Fontaine, ĉar en Esperanto rimas nur samkategoriaj vortoj, per jena poemo en kiu "rimiĝas nur vortoj apartenantaj al diversaj gramatikaj kategorioj":

Sur lir' dukorda, diris oni
Ne eblas rima son', kaj jen
Pro tio devas takt-bastoni
Antikvajn rimojn Lafonten'.

Do mi demandas ridetante,
Ĉu ne aperos ankaŭ sen
Ornama rim' estrin' de Dante,
Vestite en ĥiton' aŭ ĥlen'.

Dukorda liro? — Tial zumi
Kaj tinti adasiste mem
Mi devas? Kordojn havas du mi,
Sed fingrojn kvin por kord-ekprem'!

Dukorda lir' ne igas fini
La kanton, se nur en lernoj'
De l' granda majstro Paganini
Ni studis diligente plej. Ktp.³

Jes, Esperanto estas riĉa je rimoj, kaj pro tio kelkfoje la tradukanto sukcesas liveri tradukon eĉ pli belan ol la originalo.

4

Sed nun mi venas al mia lasta temero, kaj mi devos trakti ĝin pli supraje, ol mi dezirus. Poste mi verkos kompletan studon pri la demando, kiu eblas kompari la evoluon en nia

lingvo kun la simila evoluo en la naciaj lingvoj kaj tiri el tiu komparo utilajn konstatojn. Sed dume mi nur skizas por vi kelkajn ĝeneralajn konsiderojn.

Temas pri la tiel nomataj neologismoj. La vorto neologismo estas tre misaplikita en Esperanto. Ĝi signifas: "Vorto aŭ frazo antaŭe neuzita en la lingvo." Tamen oni ofte nomas neologismo vorton uzitan dum 40 jaroj en lingvo 60jara. Tio estas granda eraro. Ekzemploj pri tio estas "trista", kiu aperis proksimume en 1910 (se mi precize memoras, Piĉ difinas al ĝi la daton 1908), kaj "rara", kiu aperis proksimume en 1920, kaj ambaŭ estas de tiam daŭre uzitaj de plej bonaj aŭtoroj. Certe ne eblas plu nomi ilin "neologismoj". Ili estas "neoficialaj vortoj."

Aŭ, se mi volas uzi, ni diru, la vorton "despero", ĥoro da voĉoj tuj krias "neologismo", kvankam la vorto estas pli ĝuste arĥaismo, ĉar Schullhof jam en 1912 titolis verkon "Per Espero al Despero". La vorto poste ne estas vaste uzita, tial se mi volas revivigi ĝin, ĝi estas "arĥaismo", ĉu ne? — ĉar ĝi jam estas uzita en la lingvo, sed ne radikigiĝis. Se mi uzas ekzemple la vorton "ruth" anstataŭ "pity" en angla lingvo, ankaŭ tio estas arĥaismo.

La vera poeto uzas la ĝustan vorton. Kiam eble, li uzas la jam ekzistantan vorton; kiam kontentiga vorto ne ekzistas, li tamen ne hezitas alpreni vorton el alia lingvo. Tio estas ĝenerala en ĉiuj epokoj kaj landoj. Aristotelo, ekzemple, klare permesis al la poeto "ĉe kreadon de vortoj" en okazo de neceso. Kaj ĉiuj nacilingvaj literaturoj trapasis epokon, kiam oni kreis novajn vortojn tre, tre libere; poste sekvis periodo de kribrado kaj normigo: la vere utilaj neologismoj fariĝis "oficialaj", kaj la malpli kontentigaj formortis. Ĝenerale tiu laboro estas farita de unu granda geniulo (en Anglujo: Spenser), aŭ kunlaboranta grupo. En Esperanto tiu epoko eble jam venis. La granda kontribuo de Kalocsay al nia lingvo kuŝas en tio, ke li kolektis, kribris kaj registris la vortojn proponitajn de aliaj. Mem li proponis tre malmultajn. Per tio li transprenis la lingvon pli proksimen al la tempo, kiam oni ĉerpos siajn vortojn ne el vortaroj, sed el la literaturaj verkoj, kiel estas normale en la naciaj lingvoj. Kalocsay diris⁹, ke la du vortoj "trista" kaj

"povra" per si mem ebligis la tradukon de centoj da poemoj, kiuj sen ili devus resti netradukitaj. Tio certe estas vera, kaj tio pruvas por mi, ke tiuj du vortoj estas necesaj. Ekzemplon de tio liveras la unua strofo de la "Elegio" de Gray:

The curfew tolls the knell of parting day,
The lowing herd winds slowly o'er the lea,
The ploughman homeward plods his weary way,
And leaves the world to darkness and to me.

Unue la tradukinto verkis:

Funebras sonoril' pri tagomorto,
de l' kampoj brutoj muĝaj lante pasas,
trenpaŝas la plugist' al hejmokorto,
kaj al mi kaj al nokt' la mondon lasas.

Sed ni tuj vidas 1) ke la vorto "korto" estas simpla keĵlo alprenita nur pro la rimpostulo, kaj havas nenion komunan kun la originalo; 2) la vorto "weary" tute ne estas tradukita. Do la poeto ne kontentigiĝis, kaj li solvis la strofon jene:

Tagmorton signas sonorila tristo,
de l' kampoj brutoj muĝaj lante pasas,
trenpaŝas lace hejmen la plugisto,
kaj al mi kaj al nokt' la mondon lasas.

Jen solvo, kiu evitas keĵlojn kaj tradukas ĉiom la originalon. Oni certagrade rajtas pretendi, ke neoficialaj vortoj estu relative maloftaj; sed kelkaj nepre estas necesaj.

Ekzistas ĉiam la problemo pri nuancoj. La ekzistanta vortmaterialo de Esperanto povas multon, tamen ne mankas tute klaraj nuancoj, kiujn ĝis nun ne eblas tute kontentige transdoni en Esperanto.¹⁰ Malgraŭ opozicio, iom post iom Esperanto ensorbos radikojn por esprimi tiujn nuancojn. Precipe en la poezio oni renkontas tiajn nuancojn; tial poezia fakvortaro estas nepre necesa. Oni ne sufiĉe atentis la gravecon de la kunteksto, kiam oni dekretas pri la neceso aŭ neneceso

de tiaj vortoj. Fakvorto povas esti fakte necesa en 99 el 100 kunteksto, tamen neanstataŭbla en la 100a. Mi citos nur du kuntekstojn, en kiuj fakvortoj ŝajnas al mi sendube necesaj. 1) En "Tra la Ventego" (Smirnenski) p. 19, ni trovas la verson¹¹:

Malsupren, malsupren, malsupren,
descendu vi nun!

Eĉ se ni malatentas la ritmopostulon, la trifoje batanta "malsupren" tute forrabus la efikon de la fina verso, se la poeto dirus "malsupreniru" aŭ simile anstataŭ "descendu": ĝi fariĝus simpla ripetiĝo, malforta pro la alilokita akcento, anstataŭ krescendi per "descendu"! 2) En "British Esperantist" (1950, p. 176), aperis poemo mia "Dumnokta Aviado", kies tekston la redaktoro ŝanĝis. (Necesas diri, ke li poste skribis al mi, ke tio okazis pro redakcia eraro.) Anstataŭ mia verso:

Obskur' — krom ke fantoma lumo
en la kajuto fosforeskas.

oni presigis:

Mallum' — krom ke fantoma lumo
en la kajuto fosforeskas.

Ŝajnas al mi, ke la poezia efiko de la verso estas tute detruita per tiu ŝanĝo. Poczo estas dependa de la sumo de efikoj, kaj la efiko de la dua alternativo estas tute alia ol la efiko de la unua: oni povas senti, ke "obskuro" povas enhavi lumon; sed mallumo (t. e., plena manko de lumo) nepre ne povas enhavi lumon. La figuro estas tute falsa.

Do en ambaŭ kunteksto, la poezia fakvorto ŝajnas al mi la sola ebla.

5

Jenaj teorioj estas ĉerpilaj el la sperto. Sed finfine valoras nur la rezultoj. La sola celo de la tradukanto devas esti: liveri

la plej belan kaj fidelan tradukon, kiun li kapablas. Necesas senfina polurado de la traduko kaj plibonigo de la originalo¹². Laŭ mi, la livero de fidela traduko estas etika problemo; finfine oni povas certgrade blufi per malfidela traduko, ĉar la granda plimulto el la legantoj povas juĝi nur laŭ la traduko, ne konante la originalon. Sed la celkonscia kaj konscienca poeto konscias siajn mankojn kaj ne klopodas kaŝi la malfortaĵojn de siaj solvoj.

Kaj certe li devas tiri siajn teoriojn el la praktika sperto, kaj ne konformigi sian praktikon al anticipaj teorioj.¹³

¹ Post la prelego oni deklamis plurajn specimenojn el la tradukita materialo, por ke oni juĝu, ĉu la nivelo valorigas la konkludojn el ĝi tiritajn. Tio bedaŭrinde ne eblas ĉi tie.

² "Esperanto", n-ro 533, p. 37.

³ Oni tamen ne supozu, ke per jenaj citaĵoj mi volas malagnoski la altan nivelon de la Sveda Antologio. Ĝi estas unu el la trezoroj de nia literaturo.

⁴ Ekzemple: "Sonoriloj" (Poe-Kalocsay), Literatura Mondo 1947, n-ro 1; "Soneto el Thyrea" (Ferguson-Dinwoodie), L. M., 1948, p. 102.

⁵ Literatura Mondo 1931, p. 144.

⁶ British Esperantist 1950, p. 177.

⁷ vd. Hungara Antologio p. 171.

⁸ Por la plena teksto, vd. "Parnaso de Popoloj" de Antoni Grabowski, p. 10-12.

⁹ "... sole la du vortoj tristia kaj povra ebligis formfidelan tradukon de multaj poemoj, kiuj sen ili estus nekonkereblaj." — K. Kalocsay, "Publika Letero al s-ro Dratwer" en Lingva Kritiko, feb. 1933.

¹⁰ Pensu ekzemple pri diversaj nuancoj de la angla vorto "desperate". Oni povas nur proksimume redoni la signifon de "gusty". La plej proksima traduko de la tre esprimiva "bleak" estas la neoficiala vorto "morna". Kaj tiel plu.

¹¹ Malgraŭ s-ro Rust, kiu skribis (Esperanto, 1950 p. 148), "la tradukintoj de la poemoj ŝajnas intence eviti vortojn ne en la Plena Vortaro", troviĝas en la volumo ne nur "descendi" sed ankaŭ "obskuro".

¹² "Oni devas subteni sian aŭtoron, kiam li lamas." — A. F. Tytler: On the Principles of Translation.

¹³ Kp. Wordsworth. Ĉiu konsentas, ke li verkis altnivelan poezion nur kiam li rezignis pri siaj teorioj!

Sendankeco?

De Rudolf Anders

Koncerne la referaton de sro Kohen-Cedek pri Max Nordau en nro 3/50 oni permesu al mi kelkajn kritikajn rimarkigojn. Ja ankaŭ mi sentis min alparolita legante la riproĉon, ke la mondo, forgesinte ĉi tiun publiciston, montras sin sendanka. Do mi pripensis, ĉu la mallaŭdo estas trafa.

Kiam la ĉefverkoj de N. aperis, mi estis infano, kaj poste, dum ili restis ankoraŭ aktualaj, mi ne estis sufiĉe matura por deziri legi ilin. Hodiaŭ jam ne eblas havigi al mi la librojn. Sekve mi estas ne kompetenta nek kapabla por juĝi ĝenerale, ĉu prave aŭ ne la mondo ilin plu ne atentis. Ĉar tamen ŝajnas al mi, ke la dirita referaĵo indas konsideron kaj diskuton, mi deziras respondi. Sed mi devas limigi min per la komunikaĵoj de la referinto.

Aparte rimarkindaj ŝajnas al mi jenaj frazoj (p. 6): "Ĝi estis 'La konvenciaj mensogoj de la kultura homaro'. En tiu (unua ĉef)verko la aŭtoro pruvas la falsecon de multaj moroj, de kondiĉoj kaj sociinstitucioj de nia nuna kulturvivo, kiuj estis historie kreataj kaj de ni herdataj sed tamen bazitaj sur sintrompo aŭ mensogo, de la praa institucio de geedziĝo ĝis la eklezio, de simplekutima kaj scienca superstiĉo ĝis la ideo de monarkismo." Kaj plue post la unua alineo: "Kaj la mondo eksiblis kiel serpento, kies voston oni piedpremas. La Vatikano kondamnis la legantojn al la eterna Geheno, ĉar la libro subfosas la fundamentojn de la Dieklezio."

Konsiderante tiujn frazojn kune kun la tradukita fragmento "Ĉu postmorta vivo estas dezirinda?" (p. 11), oni devas konkludi, ke Nordau ne nur "kiel antikva profeto senkompate vipis la malperfektaĵojn de nia vivo", sed ke li atakis esencajn principojn de multaj religioj kaj precipe de la kristanismo. Ĉu ne estas iome troigita la postulo, ke "la mondo" (al kiu ja apartenas ankaŭ la religianoj) estu danko pro la vipoj?

Tute ĝenerale dirite: la valoro de tiaj kapucenaj moralpredikoj estas ne granda. La homoj, legante ion tian, plejofte ne emas rilatigi la mallaŭdojn al si mem. La plej multaj malice

kontentigas, per la konstato ke la aŭtoro tiel trafe senmaskigas la "aliajn". Kaj se iu leganto estas tuŝata, la eventuala bona ckintenco estas nur pasa, ĝi perdiĝas sub novaj impresoj kaj per la influo de la kutimo. La famo de la pentpredikanto Abraham a Santa Clara (1644—1709) pluvivis ĝis en nia tempo. Ke tamen lia elokvento kaj fervoro ne multe efikis, tion montru jena anekdoto al ni tradiciita:

Iudimane Abraham a S. C. sciigis, ke inter liaj aŭskultantoj sidas viro tre malskrupula pri la edzeca fidelo. La energia Patro, starante en la katedro, diris: "Se tiu viro ne ĉesigas sian malĉastan konduton, mi diros publike lian nomon la venontan dimanĉon." — La dimanĉo venis, kaj oni konigis al la monaĥo novajn faktojn, kiuj pruvis, ke la adulemulo neniel pliboniĝis. La predikanto enigis la manon en la vastan manikon de sia monalia robo, elprenis silikŝtonon, montre etendis ĝin kaj diris: "Tiu, al kies kapo mi nun jetos ĉi tiun ŝtonon, estas la pekulo!" Sed kiam li eksvingis la manon — ŝajne por ĵeti — jen vidu: ĉirkaŭ cent viroj klinis timeme la kapon! — "Hoĥo!" per tondra voĉo kriis la kapuceno, "mi pensis havi en la komunumo unu pekulon, sed mi vidas ke estas multe pli da ili!"

La historieto atestas, ke ankaŭ pastroj, minacante per "eterna Geheno", nur iomgrade sukcesas venki super la homanimaj fiinklinoj de ilia paŝtataro, kvankam ja ilia aŭtoritato sur la eklezianoj estas multe pli potenca ol la influo de iu verkanta laiko. Ĉu do oni daŭras atendi, ke la moraliza efiko de la "vipado" de Nordau estas pli persista? La dramecaj okazintaĵoj en la pasinta duonjarcento ne supozigas, ke la homoj aliĝis. Kontraŭe mi timas, ke la atakoj kontraŭ "la praa institucioj de geedziĝo ĝis la eklezio" vekis pli da malbonaj instinktoj ol da bonaj. Forpreni de simpla homo la religian kredon, la mistikan respekton al ia plej supera aŭtoritato kaj kune kun tio la internan moralan apogon estas multe pli facile, ol doni al li anstataŭe ian etikan surrogaton. Ja la voĉo de la "leĝo en mi" (Kant) estas tro malforta kaj nedifinita en vulgara homo necrudita, la malbonaj inklinoj kaj pasioj ĝin sufokas.

Mi pensas ke sufiĉe bone mi scias pri ĉio, kion pli malpli

prave oni povas riproĉi al la "Dicklezio". Sed kutime la kritikantoj konsideras kaj traktas nur la negativan flankon. Pli objektiva juĝanto ne neos, ke la kristana doktrino, kulminanta en la postulo: amu vian proksimumon kiel vin mem!, estas nepre ideala kaj perfekta "fundamento", kaj ke la kristanismo dum la du jarmiloj da ekzisto donis al sennombraj homoj edifon, konsolon kaj benon. Kion do eklezianoj dum la paso de jarcentoj pekis per netoleremo (ĉe kruelo), potencavido, akiremo, malvirto kaj fariseismo tuŝas nur la denature pekamajn homojn, ne la esencon mem de la kristanismo. Oni rajtas — kondiĉe ke oni mem estas senmakula — kritiki kaj kondamni tiujn pekojn aŭ ĉe krimojn kontraŭ la kristanismaj principoj, sed oni pro tio ne pravus, se oni volas "subfosi la fundamentojn de la Dicklezio".

Mi ne scias, ĉu la cionisto Nordau estis ortodoksa judo, sed el pluraj publikaĵoj de la referinto mi konkludis, ke li estas tia. Ĉu la mosea leĝo ne sankcias la geedzcon kaj rigore punigas ĉian adulton, eĉ per puno de morto? Kiel do anoj de la juda religio povas deziri abolon de tiu institucio? Cetere ja N. mem edziĝis. — Sed mi rezignas ĉi tie esplori la demandon, ĉu vere la geedzeco estas prave forigenda. Ĝuste ĝia "praeco" ŝajnas forta argumento por la pludaŭrigo. Oni diras, ke la konsiloj denove instigadas siajn regatojn vivi en legitima edzeco. Sekve la libera amorado montriĝis malutila al la socio.

"La morto estas estingiĝo de la konscio kaj plena ĉesigo de la persona ekzisto. — Estas kompatige observi, kiel ĉe pensobraj scienculoj tiplane retiriĝas de tiu ĉi koncepto kaj pro malespero forkuras en nebulajn iluziojn pri postmorta vivo."

Malgraŭ la aplomba decido, per kiu ĉi tiu tezo estas elparolita, ĝi estas nepre nur nepruvita kaj nepruvebla supozo. La kompato al la naive kredemaj scienculoj estas tute ne pravigebla. Estas vero: pri la demando, ĉu kreitaj aŭ estiĝintaj animoj estas nepercontaj, *s c i e n c e* oni ne scias eldiri ion certan aŭ difinitan. Tamen en sia verko "Unsterblichkeit?" (Senmorteco?) la scienculo-kemiisto Alwin Mittasch citas multajn eldirojn de famaj pensuloj, kiuj pli malpli decide esprimis la

opinion, ke la animo daŭras ekzisti, kiam la korpo mortis. Inter ili estas ekz. Leibniz, Kant kaj Schopenhauer. Laŭ Platon (en Phaidon) la animo leviĝas al pli altaj vivoformoj. Cicero kaj aliaj antikvaj filozofoj elvolvis tiun ideon sisteme kaj skolece. La naturreligioj kaj la progresintaj religioj de la antikvaj kulturpopoloj entenas la instruon pri la senmorteco de la animo, precipe la bramano. Laŭ la egipta kredo la mortinto devis sin submeti al la juĝo de dio Osiris kaj konfesi, ĉu li estas libera de gravaj pekoj, kaj Thot pesis lian koron per pesilo.

Evidentas do ke la kredo pri senmorteco profunde radikas en la subkonscio de la homoj kaj respondas al ilia religia bezono. Pordaŭre tiu religia prainstinkto estas ne surŝutebla per dialektika persvado. Prave Kant diris, ke "sen kredo je postmorta vivo nenio religio estas imagebla".

La kuracisto August Bier konstatas, ke "vera pieco, supozante individuan Dion kaj adekvate individuan pluvivadon de la animo ne kontraŭdiras al la plej severa scienceco. Ĉiukaze la kredo je postmorta vivo donas al la homo gigantan animoforton."

La fama biologo K. E. von Baer skribis: "Jes, la natur-esploristo havas kelkan pravon por halti antaŭ la limo de la spirita, ĉar tie finiĝas la certa vojo de liaj observoj kaj lin forlasas liaj fidelaj gvidantoj: la mezurilo, la pesilo kaj la uzo de la eksteraj sentumoj. Sed li ne rajtas diri: Ĉi tie mi vidas nenion kaj povas nenion mezuri, sekve nenio povas esti, aŭ: Nur la korpa, mezurebla posedas efektivan ekziston, la t. n. spirita emanis el la korpa, estas ties eco aŭ atributo. Ni ne povas vive prezenti al ni la pasemecon de ĉiuj korpaj individuoj sen time demandi: ĉu do la spirita, kion ni sentas en ni kiel Mi, pereos aŭ daŭros? Mi same kiel vi ne scias, sub kia formo ĝi povos pluekzisti; sed ni ĉiuj portas en ni la sopiron al senmorteco kaj ĉi tiun konscion direktitan al la estonteco, kia oni povus vortigi tiun sopiron, ni ja rajtas rigardi kvazaŭ garantion, ankaŭ se ni persiste restas interne de la horizonto de naturesploristo."

La kemiisto Arvid Hedvall (1947): "Hodiaŭ estas same malscience nei nete ekziston de plej alta estaĵo kaj ian formon

de daŭra ekzisto de la homa vivo kaj ties manifestadoj, kiel antaŭ cent jaroj estus estinta malscience, nete kontesti la eblon de ekzemple televido."

"Sed ĉu postmorta ekzistodaŭro estas tiel dezirinda?" demandas Nordau. Mi kontraŭdemandas: Kian avantaĝon donas la metafizika nihilismo? Ĉu ĝi igas la homojn pli feliĉaj? Ĉu ĝi povas plifaciligi la individuajn kaj socian vivon? progresigi la homaron al pli altaj formoj de homeco: toleremo, altruismo, virteco? Fari tiujn demandojn signifas ilin nei.

En ĉi tiu mondo neniam regis nek regos justeco, eĉ ne en la revata senklasa socio. Homoj pli malpli ne kapablas esti justaj. La plej bona ŝtata leĝo kaŭzas maljustaĵojn eĉ ĝia apliko en heterogenaj kazoj. La juĝistoj — laŭ Schiller — rigardas en la leĝolibron, sed en la koron de la juĝato homa sagaco apenaŭ scias penetri. Ruzuloj eskapas tra la maŝoj entenataj en ĉiu leĝo. Sed la socio, la vivo mem, eĉ la naturo estas maljustaj. Kio al unu estas metita en la lulilon kvazaŭ nemeritita didono, tion rifuzis la naturo al alia. Unu estas dorlotata favorulo de forluno, alia pene stumblas laŭ la ombra flanko de la vivo, kaj la pezo de zorgoj kaj mizeroj dolorige premas liajn ŝultrojn. La plej bona sociordo povas nur iomete plimildigi tiujn maljustaĵojn kaj suferojn, sed ne forigi.

Se tia suferanto estas religia homo, la kredo, ke ekzistas eterna Dio, kiu juĝos juste, rekompencos la suferintojn kaj punos la malbonfarintojn, povas esti al li konsolo, eĉ la sola konsolo. Ni ne scias, ĉu tiu lasta juĝo efektive okazos, sed ĉu vere ĝi ne estus justa kompenso? Ĉu estas "dezirinde", ke malbonulo, uzurpinte potencon kaj suferiginte multajn bedaŭrindulojn sendefendajn, faru tion senpune? Ĉu male ne estas dezirinde, ke la homoj ricevu postmortan rekompencon pro siaj surteraj suferoj aŭ virtoj?

En tiu societo mi iam renkontis sinjoron, kiun mi konis kiel liberpensan mondulon. Li neniel praktikis religian ritaron. Sed kiam iu malaprobe parolis pri la eklezio li diris: "Vi tute malpravas. La eklezio estas kvazaŭ plej malmultekosta polico!" Ankaŭ tiu, kiu ne akceptas tian frivolan koncepton, konfesos ke ĝi entonas iom da vero. Certe la timo pro la lasta juĝo

detenas homojn de krimoj en okazoj kie la polico ne sukcesus ilin atingi. Efektive: la ideo, ke nenia postmorta venĝo kaj puno minacos, devas instigi primitivajn homojn al la rezonado: Se la morto tute estingos mian memon, kial do mi vivu la vivon de pario, se per rabo aŭ eĉ mortigo eblas, ke ankaŭ mi akiru havaĵon kaj ĝuu la agrablaĵojn de la vivo? (Ja tiu, kiu sekve de sia propra kulpo estas senhava, ne konfesos tion.)

Kiam mia patrino kuŝis sur la mortlito, ŝi parolis al miaj plorantaj fratinoj kaj al mi: "Ne tro malĝoju! Mi ja nun devas vin forlasi, sed post certa vico da jaroj vi sekvos min, kaj ni ĉiuj ree estos kune en pli bona mondo, kie ne ekzistas penoj, zorgoj kaj suferoj..." Ŝia firma kredo forte impresis min, kaj mi sentis ian envion kaj bedaŭron, ke mi ankoraŭ ne posedas tiun fidon... Sed kian mizeran "konsolon" mi estus doninta al ŝi, se eble mi estus dirinta: "Ne kredu tion, patrino! 'La morto estas plena estingiĝo...' Postmorta vivo estas eĉ ne dezirinda."

La homaro vivas en angoro pro minacanta tria mondmilito. Tiu dependas ne de la volo de la multaj milionoj da regatoj — ili ne volas militon — sed de la intencoj de kelkaj videblaj aŭ nevideblaj potenculoj. Ĉu ili tiel malvarmsange puŝus la homojn en neimageblan mizeron, se ili posedus la konscion pri iama respondeco antaŭ plej supera juĝonto?

Literaturo

Ferenc Szilágyi: Inter sudo kaj nordo.
Eld. Eldona societo Esperanto.
185 paĝoj. Bindita en t. n. "Integral"-kovrilo.
Formato 13×19 cm.
Prezo: sv. kr 7.75, egalvalore en aliaj valutoj.

Inter sudo kaj nordo konsistas el sep verkaĵoj kun aldona kroniko pri hungaroj en Svedlando. La kronikaj notoj ne estas tro longaj, kaj ĉiuj grupiĝas ĉirkaŭ unu temo: la lingvo. Ili estas bonhumore verkitaĵ, preskaŭ kiel amuzaj anekdotoj, sed

ili tamen havas tre seriozan enhavon kaj same seriozan konkludon: "Oni ne respektas sufiĉe la lingvon kiel malhelpon. Se oni ne bagateligus tion, ni estus jam venkintaj, kaj ni tute ne scius, ke konfliktoj estas eblaj."

La ceteraj verkaĵoj estas alispecaj kaj variaj. Inter ili estas realaj epizodoj, rakontoj, noveloj, fantazioj. Sed tio estas apuda afero. Ĉu vera, ĉu kreita de verkista imagopovo, ĉio estas rekte rilata al la vivo — al nia nuna vivo kiel tute — ĉio mem ŝajnas plena de vivo. Szilágyi estas tre lerta virtuozo de Esperanto. Pli frue mi legis de li tiajn verkaĵojn, en kiu la lingvo propre ne estas esprimrimedo, sed ja la ĉefa objekto de pensado, la temo mem. Tia maniero de verkado havas certajn avantaĝojn en Esperanto. Sed estas neutile, kaj foje eĉ malutile, kiam verkisto ebriiĝas pro la riĉa esprimovo de nia lingvo. Oratoroj estas preskaŭ sensencaj, se ili ne estas samokaze tiaj esprimrimedoj, kiuj plej adekvate kaj plej intense redonas la pensojn kaj sentojn de aŭtoro. Tiurilate ni trovas ĉe Szilágyi konsiderindan progreson. Pli asketa literaturamanto eble trovos ankoraŭ manplenon da vortoj kaj esprimoj, kiuj esence estas superflujaj. Tamen la libro certe plaĉos same multe al lingvo-entuziasmoj kiel al homoj, kiuj ŝatas libron unualoke pro ĝia sencoplena enhavo.

Pluraj verkaĵoj rilatas al pli malpli realaj temoj. En ili estas aludoj kaj ankaŭ rektaj redonoj de grandaj sociaj kaj moralaj problemoj. Szilágyi ne solvas tiujn problemojn. Li nur provas redoni, en la diritaj libropartoj, kiel homoj sentas, pensas kaj reagis, kaj ne ĉio estas esprimo de lia propra pensado. Tamen ni trovas en lia maniero de verkado almenaŭ la sugeston kiel oni eventuale povas solvi ilin individue, t. e. ne granda nombro da individuoj, por kiuj Esperanto fariĝis multe pli ol tempopasigilo.

Ne ĉiuj ĉapitroj estas same sukcesaj — en "Kiu donis, kiu ricevis?" senteble mankas koncentriĝo — sed kune ili formas tre bonan samideanan libron. Szilágyi plene estas Esperantisto, oni eble povus diri homo de nova kulturo, kaj lia libro certe estos inter la unuarangaj en nia literaturo. En komparo kun similaj rakontlibroj en kulturgravaj kaj prestiĝaj lingvoj ĝi estus pli ol tolerebla, pli ol kritikrezista; ĝi estus "laŭdinda".

La lingvo estas tre flua, sprita kaj natura. Restis iuj esprimoj, kiuj ŝajnas al mi diskutindaj aŭ eĉ eraraj, sed ili estas nemultaj kaj kelkaj eventuale povas esti preseraroj aŭ plumglitoj. El tiuj lastaj sur p. 60: konfuziga anst. konfuza; sur p. 61: konfuziĝis anst.: konfuzis; sur p. 130: senkonscienca anst. senkonseia.

"Farmo" signifas: lupreno de tero aŭ bieno. "Kokinfarmo" (p. 16), se mi bone komprenis laŭ la kunteksto, devus esti: kokinkampo, kokinpaŝtejo, kokingardeno aŭ io simila. Mi atengas pri tio, ĉar la dirita uzo de farm' fariĝas pli kaj pli ĝenerala. "Kino" estas la projekcia aparato. Mi ŝatas la plisimpligon de kinematografoj, sed devus esti: kinejo, kinoteatro, filmteatro aŭ io simila. Anstataŭ "sufiĉe" mi kelkfoje skribus "kontentige" aŭ "konsiderinde" laŭ la senco. Konscienca lingvoflego estas tre dezirinda. Tamen la malglataĵoj apenaŭ estas gravaj rilate al la bonega tuto.

L. C. Deij.

I. F. Najvin: Kiso de la reĝino.
Trad. D. Staritsky.
Nro 10 de la Epoko-serio.
Prezo: 3 s. 9 p., afr. 3 p.
Eld. The Esperanto Publ. Co. Ltd.

Tiu ĉi libro estas romano pri homoj ĉe kaj ĉirkaŭ fervoja konstruo en Belga Kongo en la tempo post la unua mondmilito. Ĝi estas aventura libro, kaj la rakonto koncentriĝas ĉirkaŭ certa okazo el kiu naskiĝas ĉiuj implikaĵoj kaj ilia evoluo ĝis la solvo en la fino. Tio donas al la rakonto firman konstruon kaj kreskantan streĉon. Sed ĝi estas ne ekskluzive aventura. La aŭtoro donas multe da atento al la rasa demando kaj estas plodanto por homeco kaj homarismo. Sed krom tio la libro havas grandan amintrigon kun kvar implikitoj. Ĉirkaŭ tiuj ĉefaj roluloj troviĝas diversaj flankfiguroj tre vive prezentitaj, kiuj bone plenumas siajn funkciojn en la rakonto. Fine estas enplekita ankaŭ bonhumoro. Malgraŭ la firma konstruskeleto la prezentmaniero tial estas iom ŝanceliĝa, jen patosa pledo por homamo kaj rasa egaleco, jen kortranĉa doloro aŭ ekstaza ĉbrio de amo, jen spirhaltige streĉa situacio, jen joviala bonhumoro kaj originalula filozofia babilo. Kiam

la aŭtoro tiras ĉiujn fadenojn por la kulmina fina akto, la agado fariĝas preskaŭ opereta kun melodrama finsceno.

Al la altvalora literaturo tiu libro ne apartenas. Sed mi supozas, ke la aŭtoro per ĝi aspiris krei nur interesan distran kaj homectendencan romanon. Se tiel, li sukcesis.

La lingvo de la traduko ne estas literaturvalora, sed oni povas flue legi ĝin, kaj ĝi kontentige plenumas sian taskon. La konstruo kaj sinsekvo de la propozicioj estas foje iom nacilingva. Tio ne ĝenas la legadon, sed ne estas bona esperantostilo en tiaj frazoj. Iuj eraroj kaj nebonaj esprimoj troviĝas, kaj ilin la legantoj mem facile vidas. La aŭtoro evidente tre ŝatas adjektivojn. Tio ofte estas ne bona signo, tamen ne ĉiam. Tolstoj uzis multe da adjektivoj kaj estis tre multvorta, tamen ĉiu vorto vivas kaj lia lingvo sorĉe kaptas la leganton. Ĉu la originalo de "Kiso de reĝino" havas similiajn lingvaj kvalitojn, pri tio oni ne povas juĝi laŭ traduko.

Mi ne konas la aliajn multajn verkojn de Najivin. Se tiu ĉi libro, kvankam siaspece tre bona kaj rekomendinda, ne estas altvalora literaturo, la aŭtoro de Cor Ardens tamen vivigas ĝin per la sama korardo por homamo kaj homeco, kiu troviĝis ĉe lia mastro kaj amiko Tolstoj.

S. E.

Resumo de la historio de Belo Horizonte.
Verkis Abilio Barreto, trad. A. Cactano Coutinho.
Por iu pli bona mondo.
La nova erao — la erao de tutmondeco kaj esperanto.
Verkis M. A. Teixeira de Freitas, trad. prof. Porto Carreiro Neto.
Ridonis: Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko.

La unua el la supraj tri verkoj estis eldonata por la brazila esperantokongreso 1949, kiu okazis en Belo Horizonte. La dua estas kolekto de dokumentoj dediĉita al la int. kongreso de katolikaj esperantistoj, okazinta en Romo en la sankta jaro 1950. La dokumentoj rilatas al kelkaj brazilaj sociaj demandoj kaj al esperanto kun konsidero al la ekleziaj konceptoj. La tria estas traduko de longa nacilingva parolado farita al eminenta publiko en Rio. Ĝi estas elokventa kaj ŝajne enhavas ĉion gravan, kio apartenas al tia titolo. Ĝi estas havebla por 5 rpk de: Brazila Esperanto-Ligo, Praça de República, 54-1, Rio de Janeiro, Brazilo.

Jarlibro de UEA 1950, dua parto.

Krom diversaj utilaj kaj necesaj informoj la dua parto de la jarlibro enhavas la duan parton de la marista terminaro, kiu aperis pasintjare. La nuna parto donas terminojn el kelkaj termingrupoj antaŭe ne traktitaj kaj fine donas liston de ĉiuj donitaj terminoj en esperanto, angla, franca, germana kaj hispana. Oni anoncas, ke ambaŭ partoj de la terminaro post kelkaj semajnoj estos haveblaj kune en unu volumo en kutima formato.

Dro Ivo Lapenna: Retoriko.
Prezo: 500 fr. frankoj, aŭ 10 angl. ŝ., aŭ
1,50 us. dol., aŭ egvalore; 10 % por sendkostoj.
Mendebla ĉe Libroservo de UEA, ĉe ĉiuj pli gravaj esperantolibrejoj kaj libroservoj aŭ ĉe la aŭtoro.

Antikvaj retoroj estis instruistoj pri parolarto. La instruo de kelkaj el ili, ĉiokaze la retoriko de postaj retoroj, iam fariĝis kolekto de formuloj kaj ŝablonoj. Nuntempaj verkistoj ne malofte ekzekutis retorikon: "Retorika lingvo estas komparebla kun vidotikla aŭ kolorperdinta vestaĵo." — "Kiu verkas retorike mensogas!"

La supraj eldiroj rilatas al poezia kreado kaj ne estas ĝenerale validaj. Cetere retorika lingvo estas bone defendebla eĉ en poemo, kiam la poeto konscie daŭrigas tradicion. Ĉiokaze ekzistas diversaj konceptoj, kaj la libro tial devus havi alian titolon: "Gvidlibro pri parolarto" aŭ simile.

Ĝi estas taŭga gvidlibro! La verkinto kolkfoje diris, ke estas tre necese studi parolarton, sed li ne donas rigoraĵajn regulojn. "Temas nur pri larĝaj principoj, ne pri leĝaj reguloj aŭ striktaj ordonoj."

Legantoj trovas abundon da elastaj konsiloj, kiuj ŝajnas tre bone uzeblaj en multaj ĝeneralaj kaj eĉ en specifaj okazoj, kaj kiuj estas verkitaĵoj en plaĉa maniero, tute kvazaŭ la aŭtoro pensus: Se vi povas uzi miajn konsilojn uzu ilin, se ne, daŭrigu vian vojon laŭ propra serĉado kaj studado, ĉar tio finfine estas la plej fundamenta afero por ĉiu oratoro — same kiel por ĉiu verkisto.

En tiu senco la libro havas nenion komunan kun la tro arbitraj lernolibroj pri retoriko, kiuj estis uzataj kaj eble ankoraŭ estas uzataj en kelkaj lingvoj aŭ lingvomedioj. Homoj, kiuj havas kontentige da sento por lingva formado antaŭ publiko, kontentige da talento diri la aferojn en la ĝusta maniero, certe legos la konsilojn kun granda profito. Tiam talenton tamen havas nur tre malmultaj el tiuj, kiuj oratoras. Mi pensas pri paroladistoj ĝenerale, ankaŭ nacilingvaj. Sed la libro estas tre valora ankaŭ por tiuj, kiuj deziras lerni la arton aŭskulti! Eduki publikon estas signifograva laboro.

Dro Lapenna traktas la aferojn klare, kun ordo, kaj en bonega lingvo. Oni povus sole rimarkigi, ke li donas tro multe aŭ rakontas pri eksteraj aŭ formalaj aferoj tro larĝe kaj per tro multe da vortoj. Pri la parolarto mem li diras sur p. 94:

"Same tiel oni regule pilliŭtigadas laŭgrade la voĉon dum la parolada "pentrado", kiam, nome, oni pli multe impresas la publikon per la ekstera sono, per la muziko de amasigitaj vortoj, ol per la preciza interna enhavo de ĉiu el ili. En tiaj okazoj oni devas ne permesi al la aŭskultantoj analizi la unuopajn vortojn, ĉar la oratoro ne eldiras ilin kun tiu celo, sed kun la celo atingi certan agordon per ilia tuteco."

Se esperanta retoriko pretendas esti arto, ĝi devas esti koncentriĝo de pensoj; ĝia klareco sekve devas esti pli granda, pli penetra ol tiu de ordinara parolado. Same kiel en poemo ĉio povas esti tiel bone kunmetita, ke oni pro la tuto povas ne rimarki la kunmeton de la partoj, sed ĉiuj detaloj tamen estu logike sencohavaj. Kolorigiloj en si mem ne estas arto.

Sur p. 147: "Nur tre malofte ili (la eminentuloj) riskos montri sian malkontenton, ĉar ili scias, ke la oratoro povas ilin ataki, ridindigi kaj kaŭzi aliajn ĝenaĵojn al ili."

Tiaj kaj similaj partoj tamen estas proksimaj al la spirito de malnovaj lernolibroj kaj malnova retoriko. Iuj legantoj eventuale povas miskompreni aŭ ĉe misuzi ilin. Sed ili estas malmultaj, kaj ĉio, kompreneble, estas skribita kun bona celo kaj plej honesta intenco.

Dro Lapenna komencis sian studon per kelkaj aliaj lingvosciencaj konsideroj per deveno kaj evoluo de homaj lingvoj. Interesiĝantoj trovos koncizan sed faktoriĉan resumon kun

kelkaj tre bonaj sugestoj kaj konkludoj. Pri la esperanta vortfarado la aŭtoro parolas iom tro entuziasme kaj sekve iom tro subjektive. Mi ne komprenas, ke "meti en la poŝon" iel akvigas la batan esprimforton de "enpoŝigi". Kaj kion faras homo, kiu ĉiam profesoras? Ĉu li prelegas en universitato, ĉu li faras sciencajn studojn aŭ ĉu li eble kondutas distrite kiel ĉiam faras la profesoroj sur la amuza paĝo de semajna revuo? Tiaj esprimoj ofte haltigas la pensojn; ili iom ĉirkaŭkuras kaj fine mi konkludas, ke verŝajne okazis tio aŭ tio, sed tiaj dirmanieroj ne kontentigas mian lingvan senton.

Pri unu afero mi aldonu informon. Nikolaj Marr profetis, ke la naciaj lingvoj iam kuniĝos en unu tuthomaran lingvon. Sovietiaj esperantistoj komprenis, ke tiu natura kunproksimiĝo de naciaj lingvoj okazos sendepende de Esperanto, kaj sekve ili mem grave bagateligis la rolon de la internacia lingvo aŭ ĉe tute malkonfesis ĝin.

Preso, bindo kaj papero bedaŭrinde estas ne bonaj.

L. C. Deij

Aldona rimarkigo.

Sur kelkaj paĝoj en la komenco de Retoriko la aŭtoro mencias la teoriojn de Marr. Mi ne legis la verkojn de Marr pri lia nova lingvoscienco, nur mallongajn referatojn. Tial mi ne povas trakti ilin, kaj cetere ne estus loko por tio en mallonga rimarkigo. La referatoj, ankaŭ tiuj en Retoriko, donas la impreson, ke la nova lingvoscienco de Marr, malgraŭ lia granda erudicio, grandparte ŝajnas bazita pli sur mania fantaziado ol sur scienca racia rezonado. Sed la afero Marr estas interesa el alia vidpunkto, tial la rimarkigo.

Je la revolucio Marr senrezerve aliĝis al la bolŝevikoj. Sian novan lingvosciencan li kunligis kun la marksisma dialektiko. La lingvo estas dependa de la ekonomia sistemo kaj ŝanĝiĝas laŭ ĝi. Verŝajne pro tiu adaptiĝo al la ekonomia historikoncepto liaj teorioj estis grandtrajte agnoskataj kiel la marksisma lingvoscienco. Opozicio ekzistis, kaj en 1940, ses jarojn post la morto de Marr, Instituto por lingvo kaj penso, fondita de Marr mem, malaprobis lian teorion pri la kvar praelementoj

de la parolo: sal, ber, jon, roŝ. Malgraŭ certa kontraŭstaro ĝi estis kaj ĝis 1950 restis la politike agnoskita lingvosciencia doktrino en Sovetio. "La rusa lingvo" de la eminenta slavisto V. Vinogradov estis en 1947 akceptata kiel lernolibro por la altlernejoj. Literaturnaja gazeta kritikis ĝin kaj kulpigis Vinogradov pro "pseŭdosciencia objektiveco" kaj "sklavanimeco antaŭ eksterlando". Li citis eksterlandajn sciencistojn sed silentis pri la konceptoj de Marx, Engels, Lenin, Stalin kaj Marr. La 22an de oktobro 1948 la instruista kolegio ĉe Instituto por lingvo kaj penso kaj la leningrada sekcio por la rusa lingvo de la scienca akademio faris rezolucion, en kiu oni kondamnis la burĝan, "idealisman" lingvoesploron kaj ĝiajn sekvantojn en Sovetunio, inter ili Vinogradov, kaj en kiu oni vokis al batalo por "la materialisma lingvoscienco fondita de Marr". La 21an de julio 1949 la prezido de la Sovetunia scienca akademio faris similan eldiron.

Laŭ tio ŝajnas, ke la aprobo de la ideoj de Marr grandparte estis politika afero. Eble pro tio ili rapide disvastiĝis en certaj rondoj en aliaj landoj, ankaŭ inter esperantistoj.

La 9an de majo 1950 Pravda disponigis lokon por "libera diskuto pri la nekontentiga stato de la sovetia lingvoscienco". Pri la kaŭzo de tiu diskutinvito ni ne scias. La unua artikolo en la diskuto estis de Cikobava, profesoro en Tiflis, kaj ĝi forte atakis la doktrinojn de Marr kaj nuligis lian valoron. La 20an de juni venis la fama eldiro de Stalin "Pri la marksismo en la lingvoscienco", kaj per tio la doktrinoj de Marr jam apartenas al konceptoj, kiujn oni ne rajtas aprobi. La 4an de julio konfesis la plej eminenta el la disĉiploj de Marr: "Nur nun, kiam ni profunde konsideris la ecojn de la lingvo, kiujn kamarado Stalin klarigis al ni en sia fundamenta artikolo, kiu enkondukas novan epokon en la sovetia lingvosciencia historio, nur nun ni, kiuj antaŭe senkritike sekvis Marr, plene komprenas la detruan en la teoria vojo, kiun sekvis niaj esploroj kaj sur kiun ni kondukis la junan generacion."

S. E.